

El la estraro de Germana Esperanto-Asocio

La estraro de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kunvenis la 6an de majo kaj la 2an de septembro, krome kadre de la Germana Esperanto-Kongreso komence de junio en Brunsiko, kune kun la estraro de Germana Esperanto-Junularo (GEJ). Jen la plej gravaj rezultoj.

Ret-paĝoj: Komisiito serĉata

La estraroj de GEA kaj GEJ decidis pri nova aspekto de la komuna ĉefpaĝo www.esperanto.de. La novan ĉefpaĝon laŭ la komuna decido verkis Marcos Cramer kaj Kristjan Schmidt de la reta komisiono de GEJ. Koran dankon al ili. GEA-membro Jan Ulrich Hasecke proponis en Brunsviko novan teknikan koncepton per enhavomastrumada sistemo Zope. Pro la ĝisfunde necesaj ŝanĝoj la ĝisnunaj paĝoj (escepte de la ĉefpaĝo) restos provizore flegataj. GEA daŭre serĉas komisiiton, kiu povus helpe de Jan Ulrich Hasecke krei novan GEA-paĝaron per Zope.

Membro-administrado: Same necesas posteulo

Laŭeble GEA volas transiri al la datumbanka sistemo, kiun GEJ jam funkciigis en la reto. Sed ankaŭ por tio necesos nova komisiito. D-ro Jörg Gersonde, kiu ĝis nun administris la GEA-membraron, transprenis la gvidan funkcion en la organiza grupo de Printempa Semajno Internacia. Tial lia ŝarĝo troiĝis.

Fine klareco pri familia membreco.

Jam delonge ekzistas familia membreco en GEA/GEJ. La celo estas, ke familio kun infanoj pagu ne pli multe ol seninfana paro. Kiel "familio" validas ĉiuj samadresanoj. La unua GEA-membro pagas 46 EUR (kun *Esperanto aktuell*), la dua GEA-membro 23 EUR (sen *Esperanto aktuell*), infanoj estas inkluzivaj. (Se minimume 1 infano estas en GEJ-aĝo, GEJ ricevas 23 EUR) Membriĝaj formularoj: Per ununura subskribo eblas deklari sian aliĝon al pluraj registritaj asocioj. Tiel ekzemple nova membro en GEJ-

aĝo deklaras sian aliĝon samtempe kaj al GEJ kaj al GEA. Analoge oni povas samtempe membriĝi en membro-organizo de GEA. La koncernatoj atentu, tiucele ĝuste kompili la aliĝilojn.

Plia kunlaboro de GEA kaj GEJ

La estraranoj de GEA kaj GEJ estis tre kontentaj pri la komuna kunsido en Brunsviko kaj intencas plifortigi la kunlaboron. Tiel decidis la GEA-estraro, kunveni denove kun la GEJ-estraro kadre de la jubilea Internacia Seminario en Wewelsburg (apud Paderborn), datopropono estas la 28a de decembro je la 15a. Ankaŭ la samaj administraj datumbankoj gvidu al estonte senproblema interŝanĝo de informoj. Jam nun la GEA-membroj, kiuj laŭaĝe forlasos GEJ fine de la aktuala jaro, ricevadas senpage *Esperanto aktuell*. Plie GEA transprenis la kostojn por la komuna servilo de www.esperanto.de.

Traduko de Zamenhofstrato

Sekve de alvoko en *Esperanto aktuell* 2006/2 anoncis sin sperta Esperantisto, kiu intertempe finis la unuan provizoran tradukon (de Esperanto al la Germana). Andreas Emmerich daŭre klopodas trovi nun eldonejon, kiu pretas eldoni tiun interesan verkon. Propoj, atentigoj estas bonvenaj.

Konsilantaro reaktivigenda

GEA ŝatus revigligi la konsilantaron, kiu estu rondo de aktivuloj el la diversaj membro-organizoj. La unua kunveno nepre estu kadre de la venontjara Germana Esperanto-Kongreso en Hamburgo. La membroj helpu ideojn kaj age al la estraranoj kaj gvidu la komunan laboron en la diversaj regionoj, grupoj resp. fakoj.

Nova estraro ekde 2007

La nunaj estraranoj pretas daŭrigi sian laboron, se oni reelektas ilin en 2007. Ĉar Andreas Emmerich post ses jaroj laŭstatute ne povas resti prezidanto, li kaj la nuna vicprezidanto, d-ro Rudolf Fischer, planas interŝanĝi siajn postenojn. La estraro tamen substrekas, ke estus dezirinde, se pliaj, precipe pli junaj kandidatoj sin proponos, por ke la estraro ne tro aĝiĝu. Krome mankas ĝis nun virinoj.

Herzberg nun filio de GEA

Pro la elstara laboro de la Germana Esperanto-Centro en Herzberg la estraro decidis, nomi ĝin filio de GEA. La celo restu klerigo kaj ekzamenoj. Tiel longe kiel la financoj tion permesas, la filio havu ankaŭ pagata(j)n dungito(j)n. La situacio en Berlino: Paŭlo Ebermann, kiu laboras por GEJ en ties Berlina Oficejo (BerO), pretas funkciigi ankaŭ poŝtkeston por GEA (informpetoj ktp.). Tio meritas multan dankon, des pli, ĉar la kunlaboro kun li jam bone funkcias. Longdaŭra celo de GEA estas tamen, havi tie pagatan dungiton, kiu iom post iom kreos centran oficejon de GEA tie. Ekzemple la membroadministrado de GEA kaj GEJ povus estis tiam komune farata. La estraro sondos en Berlino kun la posedanto de la domo, Johano Pachter, kio dum la venontaj jaroj tie realigeblus. Ĉefe oni serĉas fidindan Esperantiston, kiu identigas sin kun GEA, kaj pretas, komence per nur tre malalta salajro ekigi la laboron.

Finaj rimarkigoj

Per tiu bunta gamo de faritaĵoj kaj farendaĵoj la GEA-membraro havu trafan impreson, ke "malantaŭ la kulisoj" de GEA kaj GEJ moviĝas multe, kvankam ĉiuj postenuloj daŭre dolore spertas, kiel malmulte el la lavango de taskoj oni kapablas atingi kaj realigi. Se vi volas turni vin al la estraro per iu movada problemo, skribu en la reto al deb@esperanto.de (Martin Schäffer), paperpoŝto iru al la vicprezidanto.

Raportis
Rudolf Fischer

Videofilme vom GEK 2006

Sämtliche Hauptvorträge des diesjährigen Deutschen Esperanto-Kongresses in Braunschweig wurden von Sebastian Kirf mit professionellem Equipment aufgezeichnet. Die Überarbeitung des aufgenommenen Materials wird in Kürze beendet, so dass die Vorträge auf DVD zur Verfügung stehen (auf Wunsch ist auch eine Kopie auf VHS-Kassette möglich). Insgesamt wurden acht Vorträge aufgezeichnet. Ferner gibt es Ausschnitte

REVELO-tago en Meschede

Fine de aŭgusto okazis tago de la REVELO kune kun la REVELIDO ĉi-foje en la monaĥejo de la Benediktanoj en Meschede. Ĉirkaŭ 40 esperantistoj de proksime kaj malproksime - unu gasto eĉ el Brazilo - vojaĝis en la tiean "Ruhr"-regionon.

Kadre de la ĉefkunveno organizis la lokaj membroj diversforman interesan programon. Tiu ĉi komenciĝis per humure prezentita informprelego de juna monaĥo pri la historio de la Benediktanoj en Meschede. Sekvis rondpromeno tra ties tereno kun multaj interesaj informoj, ĉefe pri la propra ekonomio kun kelkaj metiejoj kaj la granda renoma gimnazio.

Dum la oficiala parto de la renkonto okazis la elekto de la estraro. Oni elektis Petra Dückerhoff kiel novan prezidantinn de REVELO kaj Rosa Ebel kiel vicprezidantinn. Pluaj estraranoj estas Heinz Muhsal (kasisto), Ludger Schmeink (sekretario), Rudolf Fischer (pliklerigo), Wolfgang Loose (rondvojaĝo, organizado), Otto Nelken (publikaj rilatoj) kaj Andreas Diemel (junularo).

Post amuza lumbildprelego de Bernd Schönberger pri personaj impresoj de sia vojaĝo tra Italio kaj de la UK en Florenco sekvis ĉe suna vetero bela ŝipvojaĝo sur la lago "Hennesee". Tiu ĉi travivaĝo signifis samtempe la finon de zorgeme planita kaj sukcese organizita eventoplana REVELO-tago

Otto Nelken

2. MES auf der Marienburg

Der noch junge DEB-Landesverband Rheinland-Pfalz hat für das dritte Septemberwochenende zu einem Esperanto-Treffen eingeladen. Zunächst schien jedoch alles darauf hinzudeuten, dass das Treffen mangels Anmeldungen nicht stattfinden könnte. Die Situation änderte sich jedoch, je näher das Wochenende kam. Schließlich kamen 26 Esperantosprecher und solche, die es werden wollten, auf die malerische Marienburg.

Parallel zu einem Sprachkurs fanden Vorträge zu verschiedenen Themen statt. Jean-Luc Thibias referierte über die Esperanto-Übersetzungen der Comix-Serie „Tinĉjo“. Das Referat von Peter Hauser handelte von Fachtermini im Esperanto am Beispiel der Metallbearbeitung. Albrecht Kronenberger berichtete von den Arbeiten an der kurz vor dem Erscheinen stehenden Neuausgabe der Bibel. Wolfgang Bohr zeigte Bilder vom 91. Esperanto-Weltkongress in Florenz und die Gäste diskutierten über die Licht und Schattenseiten des diesjährigen Weltkongresses. Besonders positiv herausgestellt wurde der neue Programmpunkt „Movada Foiro“. Hier stellten sich die verschiedenen Landes- und Fachverbände vor. Für die meisten war der „Nacia Vespero“ eine Enttäuschung.



Albrecht Kronenberger stellte den Teilnehmern des 2. MES die Neuausgabe der Bibel vor. Foto: Ilona Schmidt-Bohr

Am Samstagnachmittag fand die Mitgliederversammlung des Landesverbandes Rheinland-Pfalz statt (siehe Seite 9). Albrecht Kronenberger lud dann zu einer Vorabendmesse ein. Abends trafen sich die Teilnehmer zu einem Gläschen Wein oder Bier im Klubraum der Marienburg. Gerade die älteren Teilnehmer nutzten die Gelegenheit, um wieder einmal die fast vergessenen Volkslieder in Esperanto-Übersetzung zu singen.

Am Sonntagmorgen stellte Nils Klünder die neue DVD „Esperanto elektronike“ vor. Die Anwesenden diskutierten über geeignetes Werbematerial, das Jugendliche anspricht. Der Bücherdienst von „Esperanto France-Est“ stand den Teilnehmern des 2. MES während des ganzen Wochenendes zur Verfügung.

Das nächste MES findet 2007 am 4. Wochenende im September (28.-30. 9.2007) wieder auf der Marienburg statt. Die Organisatoren würden sich freuen, wenn sich die Teilnehmer früher anmelden würden. Dann müssen keine bestellten Zimmer zurückgegeben werden, die dann am Schluss wieder fehlen.

Wolfgang Bohr

Festivalo de la kulturoj

Jam la kvaran fojon okazis de la 15a ĝis la 17a de septembro la "Festivalo de la Kulturoj" en Hamburgo sur la universitata studkampo. Ĝi celas la interkonatiĝon de la kulturoj. Ĉi-jare ankaŭ partoprenis Hamburga Esperanto-Societo. Sur la informstano meze de aliaj informstanoj, scenejoj kaj stanoj de artmetioj la Hamburganoj informis pri la eblecoj de Esperanto.



Kerstin Baasch, Jürgen Wulff, Pia Haasis kaj Ralph Glomp dum la festivalo de la kulturoj.

Dum suna malfrusomera vetero estis multaj interesaj konversacioj kaj ofte subteno de la vizitantoj por la celoj de Esperanto. Helpis pli ol dek homoj dum diversaj tempoj sur la stano. La temo de la ĉi-jara festivalo estis "respekto" kiel bazo por komuna kunvivado. Sur diversaj scenejoj artistoj el multaj landoj ludis, kantis kaj dancis. Dum la sabata posttagmezo granda karavano marŝis kaj dancis tra la urbo. Granda sukceso por paca kunvivado de la kulturoj kaj ankaŭ sukceso por nia informlaboro.

Jürgen Wulff

Por dulingveco en Eŭropo - Argumentoj kaj dokumentoj / Für Zweisprachigkeit in Europa - Argumente und Dokumente

Recenzo de Rudolf Fischer

Tiu libro kun blua-blanka kovrilo, la koloroj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, el 2005 tuj memorigas al alia, tre simila, aperinta en 1994, kun la titolo: Por plurlingveco de Eŭropo – Disputo pri argumentoj / Für Europas Mehrsprachigkeit – Ein Streit um Argumente. En ambaŭ prof. d-ro Helmar Frank prezentas tre engaĝite siajn ideojn; la alian duonon skribis tiutempe d-ro Werner Bormann, al la nova libro kontribuis anstataŭe prof. d-ro Reinhard Selten. Grandan parton krome konsistigas kolekto de dokumentoj kaj plie memorando, verkita de prof. Frank.



Estas pene eltrovi, el kiuj jaroj originas la diversaj kontribuoj, kvankam la enkonduko provas informi pri la aperjaro, sed foje la Esperanta, foje la Germana versio estas la originala, kaj plie ne nepre en originala, sed intertempe prilaborita formo. Jes ja oni devas laŭdi la elspezitan penon, eldoni tian libron en du lingvoj, paralele en kolumnoj, kiuj demonstras, ke Esperantaj tekstoj bezonas iom malpli da spaco ol German-lingvaj samenhavaj (tion por la ŝparemuloj). Pli detale atentante la lingvaĵojn la leganto tamen stumblas

pri ege ĝenaj malglataĵoj, kiuj pravas, ke la reskribitan formon en la koncerna alia lingvo oni tro haste kaj sen severa kontrolo produktis: mezume du eraroj (de diversaj specoj) sur ĉiu paĝo estas simple tro por doni bonan impreson. Ekzemple dum iu teknika transformado perdiĝis granda parto de la dividstrektoj, tiel ke skribmanieroj kiel „LucianBlagaUniversität“ (p. 28) impresas strange kaj foje („05.10. Schuljahr“, p. 32) konfuzas la leganton. Same kelkaj lingvaj inventoj kiel „USAnisch“/„Usanisch“ (Germ. por „Usona varianto de la Angla“) kaj Esp. „Eŭropio“/ Germ. „Europien“ (tereno de Eŭropa Unio) kun la adjektivoj „eŭropia“ resp. „europisch“.

La plej fatala eraro estas sur paĝo 9. En raporto pri lerneja eksperimento oni legas en la Esperanta teksto, ke iu klaso unue lernis la Francan dum kvar jaroj, dum la Germana versio diras „zwei“ (du). Tio povas esti fonto por ĉarmaj misinformoj, kiam oni ĉerpas nur el unu lingva versio tie ĉi. (El la kunteksto pli poste sekvas, ke „kvar“ estas la ĝusta nombro.)

Enhavante prof. Selten raportas la evoluon de la lingvopolitika situacio en Eŭropa Unio, nenio nova, sed estas utile konsulti tiun superrigardon por refreŝigi siajn sciojn. En la diversspecaj kontribuoj de prof. Frank foje speguliĝas liaj komplikaj politikaj taktikoj, per iuj nefacile travideblaj kompromisoj veni al interkonsento kun ne-Esperantistaj instancoj kaj asocioj. Tiel li ekzemple provas vendi ne plu ILo-n (tiun Esperanto-vualon ni ja jam konas), sed eĉ „plibonigitan“, al „Eŭropio“ adaptitan „ELO-n“ (p. 22)! Por tradiciaj Esperantistoj tio estus „perfido“, se oni ne konus la ĵonglemon de la meritplena Esperantisto Frank. La postulo, en ĉiuj lernejoj instrui DU neŭtralajn elprovitajn lingvojn (p. 70), celas certe trankviligi la Latinistojn, sed ke Esperanto iĝu „la dominanta lingvo en Eŭropo“ (Selten, p. 12), ankaŭ parte instrulingvo en universitatoj (p. 93), trovos la kontraŭstaron ne nur de „Verein Deutsche Sprache“ (Asocio por Germana Lingvo), sed ankaŭ de parto de la Esperantistaro.

Selten, Reinhard; Frank, Helmar G.: Por

dulingveco en Eŭropo – Argumentoj kaj dokumentoj / Für Zweisprachigkeit in Europa – Argumente und Dokumente. IFB Verlag. Akademia Libroservo. Institut für Kybernetik Berlin & Paderborn. Paderborn 2005. 112 p. 14,8 x 20,9 cm. Dikpapera kovrilo. ISBN 3-931263-54-1

Participo gravega problemo

Rezonado de Rudolf Fischer



1. Enkonduko

Tiu ĉi teksto estas respondo al la artikolo "Esperanto-Grammatik" de mia amiko Dirk Willkommen en *Esperanto aktuell* 2006/3, p. 26/27. "La malfeliĉa diskutado pri la participoj" tute ne malaperis en Esperantujo, kiel li skribis. Jes la plej multaj Esperantistoj ne emas pludiskuti la problemon pro diversaj kaŭzoj:

- Gramatiko tedeas la ordinarnajn Esperantistojn.
- La sistemo de la participoj en Esperanto estas komplika.
- Apenaŭ iu regas la Zamenhofan uzon de la participoj (ankaŭ mi ne).

Pri la ĝusta (= Fundamenta) uzo de la participoj du gramatikaj skoloj, la t.n. itistoj kaj atistoj, dum jardekoj interkverelis. Bedaŭrinde en ambaŭ skoloj ekzistas krome subskoloj; preskaŭ ne eblas, ekhavi superrigardon pri la diversaj teorioj.

Por skizi la plej gravan diferencon jen unu ekzemplo:

„Hieraŭ la pordo estis fermita.“

Laŭ itismo tiu frazo estas dusenca, ĉar ĝi povas signifi, aŭ ke la fermo okazis hieraŭ (kaj ĝisfine), aŭ ke la pordo estis en stato post fermo, kiu okazis iam antaŭe.

Laŭ atismo nur la dua interpreto estas ĝusta. Por la unua signifo atistoj uzas „Hieraŭ la pordo estis fermata.“

(El tiu ekzemplo oni vidas, kial oni parolas pri „itismo“ kaj „atismo“.)

La formo „fermata“ tamen ne estas eb-
la el itisma vidpunkto, ĉar „fermi“ es-
tas verbo „sen daŭro kun rezulto“, kaj
la sufiksoj ANT kaj AT laŭ itismo
ĉiam indikas daŭron. Sed se la fermo
hieraŭ okazis kelkfoje, tiam laŭ itismo
tamen eblus „fermata“, ĉar tiam AT
esprimus ripeteton ...

Tiuj diskutoj ne estus tiom gravaj, se
temus nur pri harfendado inter la gra-
matikemuloj, sed intertempe la ordina-
ra lingvo-uzo estas afliktata. Ĉar ape-
naŭ iu Esperantisto regas la partici-
pojn, oni povas observi sisteman evi-
tadon de pasivaj participoj (ekzemple
per la maloportuna misuzo de -iĝ-) aŭ
indiferentan uzadon de IT (provokitan
ĉe Germanoj per la influo de la Ger-
mana pasiva participo). Lernolibroj
tial limigas sin al netiklaj ekzemploj
kiel "La letero estas/estis/estos skriba-
ta/skribita/skribota."

2. Kial la uzado de participoj estas komplika

Dum la simpla sistemo de la verbofor-
moj en Esperanto ne kaŭzas proble-
mojn kaj tial ŝajne estas sufiĉe taŭga,
la sistemo de la tri aktivaj kaj pasivaj
participoj provokas tri punktojn de kri-
tiko:

- Troa devo de precizigo

Uzante participojn la lingvoproduktan-
to ĉiam devas decidi inter la tri A-, I-
kaj O-formoj. Tio ofte estas tute su-
perflua. Ekzemple: „Sur la ŝildo la vo-
jo estas indik?ta.“

- Necesa klasifikado de verboj

Laŭ Plena Analiza Gramatiko (PAG,
p. 145/146) oni devas diferencigi tri
klasojn de la ago-verboj:

- Verboj de daŭro kaj rezulto:
skribi, konstrui, ...

- Verboj de daŭro sen rezulto: ami,
bezoni, deziri, ...

(IT-participoj „ne ekzistas“)

- Verboj sen daŭro kun rezulto: fer-
mi, naski, morti, ...

(AT-participoj „ne ekzistas“)

Tiu klasifikado estas malfacila, ĉar
kial „legi“ estas verbo de daŭro kaj re-
zulto? Kaj naskintaj virinoj certe pro-
testos, ke „naski“ estas sen daŭro ...

- Homonimeco de participa formo: ĉu

priskribo de ago aŭ de rezulto (postaga
stato) aŭ de simple stato?

„La fenestro de la oficejo estis fer-
mita.“

Interpreto:

- 1) Oni fermis ĝin. => ago
- 2) Oni fermis ĝin antaŭe. => rezulto
(postaga stato)
- 3) Ĝi tute ne estis malfermebla. =>
stato

Idiomajoj kiel „fermita rondo“, „mal-
fermita letero“ ktp. donas malĝustan
ideon de iama (mal)fermo, kaj sekve
oni renkontas eskapojn per „ferma
rondo“, „malferma letero“, en kiuj oni
provas esprimi la staton sen antaŭa
ago per simpla adjektivo, kiu tamen
tute misgvidas: kp. „malferma kunsid-
do“ ktp. Ne multe konsolas, ke tiu
problemo same ekzistas en etnaj ling-
voj. Al la Esperantistoj oni povas nur
rekomendi, uzi pli taŭgajn esprimojn,
ekzemple „privata“ aŭ „nepublika“ an-
stataŭ „fermita rondo“, „publika lete-
ro“ anstataŭ „malfermita“ k.s., kaj tiel
eviti la ambiguajn pasivajn I-partici-
pojn.

3. Participoj estas adjektivoj

Prave la gramatiko de Dirk Willkom-
men (GDW) atentigas pri la paralelaj
formoj de jenaj frazoj:

„La letero estas longa.“ / „La letero
estas skribita.“ (p. 40)

La samo validas tamen ankaŭ por:

„Li estas juna.“ / „Li estas leganta.“

La jenaj tri formoj de la sama enhavo
„Li legas libron. / Li estas leganta lib-
ron. / Libro estas legata de li.“

montras tri diversajn fokusojn: ago
(„legas“), aganto („leganta“), agato
(„legata“).

Oni do ne bezonas enkonduki „aspek-
ton“ (GDW, p. 42/43) por klarigi „le-
ganta“.

Ĉar participoj estas adjektivoj, ili ape-
ras en frazoj samloke kiel la adjekti-
vo, nome en atributa pozicio („La
longa vojo ...“) kaj en predikativa po-
zicio („La vojo estas longa.“). Estas
do superflue, en la priskribo de la lin-
gvo Esperanto paroli pri „kunmetitaj
verboformoj“. La nuraj verboformoj
en Esperanto estas la t.n. „simplaj“,
nome unuvortaj: ekzemple „legas“,
„legis“, „legos“, „legus“, „legi“, „le-

gu“. En frazoparto kiel „La longa vojo
...“ la atributo „longa“ estas mallongi-
go de „estante longa“, do: „La vojo es-
tante longa ...“ La verbo „esti“ okul-
frappe ne aldonas ion al la enhavo, tiel
ke ankaŭ eblus kompleta rimarko per
konciza esprimo „vojo longa“:

„Mi morgaŭ veturos al Romo.“ –
„Vojo longa.“ / „La vojo estas longa.“
Estas tiel suspektige, kial la diversaj
gramatikoj (plej ĝisfunde PAG) dife-
rencigas t.n. „izolajn“ participojn (t.e.
nepredikativajn) de participoj en „kun-
metitaj verboformoj“. Tion faras an-
kaŭ la Plena Manlibro de Esperanta
Gramatiko (PMEG) de Bertilo Wen-
nergren.

4. Kion signifas A, I kaj O en verboformoj kaj participoj?

Unu el la centraj tezoj de Esperanto
estas, ke la signifo de morfemo estas
sendependa de la kunteksto. Neniu
kontestas, ke la tri vokaloj A, I kaj O
en AS, IS kaj OS ne hazarde estas la
samaj kiel tiuj en A(N)T, I(N)T kaj
O(N)T. Sed en la diversaj variantoj de
itismo, traktataj ĉi tie, nome tiuj de
PAG, PMEG kaj GDW, la signifo de
A en AS, ANT kaj AT ne estas la
sama, ankaŭ ne tiu de I en IS, INT kaj
IT kaj ne tiu de O en OS, ONT kaj
OT. Kaj, pli malbone, kaj kontraŭ la
centra tezo, la signifo de tiuj vokaloj
kiel morfemoj estas parte homonima,
eĉ en la sama itisma varianto.

PMEG (paragrafo 28.1) komence kla-
rigas: ANT kaj AT signifas „dum la
ago“ (kiun esprimas la verba radiko de
la participo), INT kaj IT signifas „post
la ago“, ONT kaj OT signifas „antaŭ
la ago“. (Ekzistas ja ankaŭ verboj, kiuj
ne indikas staton kaj ne agon, ekz. „si-
di“, sed por plisimpligi la rezonadon,
mi neglektas tion tie ĉi.) Sekve ek-
zemple: La A en „batanta / batata“ sig-
nifas „dum la bato“, la I en „batinta /
batita“: „post la bato“, la O en „batonta
/ batota“: „antaŭ la bato“. Tio estas
tre alloga koncepto, konforma al la
postulata sendependa signifo de la vo-
kaloj, des pli, ĉar ankaŭ „batas“, „ba-
tis“, „batos“ klarigeblas precize tiel.
Jen la dezirata baza strukturo de sam-
signifaj morfemoj A, I kaj O.

La tuto ĝis tie ĉi sonas kiel „senaspek-

ta Esperanto“ aŭ „ekstrema atismo“ (PMEG), ĉar en la signifo de la morfemaj vokaloj aperas ja nur tempaj prepozicioj kaj ne la fama aspektoparo „perfekto“ / „imperfekto“, kiu estas baza por la itismo.

4.1 Kion signifas A en AS, ANT kaj AT?

Sed ho ve, en la sama paragrafo PMEG detruas tiun lingvoteorie idealan situacion. Unue prave: „AS montras ĉefe nuntempecon de la ago“ („ĉefe“ ĉar foje anstataŭe sentempecon, ĝeneralan validecon). Sed tiam: „dum ANT kaj AT montras daŭrecon aŭ ripeteton de la ago“. Simile oni legas en PAG kaj GDW.

PMEG (paragrafo 28.4.2) asertas, ke „en la praktiko ankaŭ artistoj uzas la ANT-formojn por montri daŭradon aŭ ripetadon“, almenaŭ en „kunmetitaj verboformoj“. Tio ne estas vera: „Bombo estis eksplodanta kaj detruanta la domon.“

Eble oni malofte uzas la ANT-formojn predikative, sed se jes, „daŭro“ aŭ „ne daŭro“ dependas de la signifo de la verba radiko kaj ne apartenu al la signifo de ANT. Same malĝusta estas la dua tiea aserto de PMEG pri atismo: „Hieraŭ la perditaj aferoj estis trovataj.“

Laŭ PMEG atistoj komprenas „estis trovataj“ tiel, ke la trovado okazis verŝajne ĝisfine. Nu, mi ne povas imagi alian trovadon ol ĝisfinan. Kaj la eblaj variantoj de la supra frazo, nome „Hieraŭ oni estis trovanta la perditajn aferojn.“ kaj „Hieraŭ oni trovis la perditajn aferojn“ estas laŭ atismo enhave samaj, nur strukture malsamaj. Laŭ tiu „ekstrema atismo“ (PMEG) regas kompleta simetrio inter la verboformoj kaj la aktivaj kaj pasivaj participoj.

4.2 Kion signifas I en IS, INT kaj IT?

Simile PMEG (paragrafo 28.1) asertas pri la signifo de I: „IS montras, ke la ago okazis antaŭ la nuno“ (prave). Sed: INT kaj IT „montras, ke la ago plenumiĝis ...“, t.e. okazis ĝisfine. En kunmetitaj verboformoj pasivaj (paragrafo 28.4.2) laŭdire INT-formo ĉiam

signalas tempan rilaton, dum IT-formo „plenumiĝon de ago, aŭ agon, kiu donis rezulton“. En GDW INT kaj IT ankaŭ servas por ĝenerala konstato (p. 46; laŭ p. 41 tamen en aktivo ne INT, sed ANT).

Ke ago farinta aŭ farita okazis ĝisfine, estas fakte plej ofte tiel, tamen ne ĝenerale valida kaj tute ne apartenas al la signifo de INT kaj IT:

„Mi amis ŝin, amas ŝin kaj amos ŝin; ŝi estas amita, amata kaj amota de mi; mia amo al ŝi estas sen limo.“ „Lerninte multe, mi nun multe scias kaj tial estas plulernanta.“ „Estas pluvinte nun la tutan someron, ĝis hodiaŭ.“ Do, la amado, lernado kaj pluvado okazis, sed ne ĝisfine ...

4.3 Kion signifas O en OS, ONT kaj OT?

Ankaŭ la signifo de O ne estas senproblema. PMEG asertas: OS „montras tempon post la nuno“. ONT kaj OT „montras staton antaŭ la komenco de la ago“ (prave), sed plie: „ofte kun nuanco, ke oni intencas fari la agon, ke oni planas ĝin, aŭ ke ĝi baldaŭ okazos“. En unu el la sekvantaj ekzemploj O eĉ havas la signifon de devo:

„Sur la tablo kuŝis aro de legotaj leteroj.“ PMEG klarigas: „La leteroj atendis la legadon.“ (Bone) Sed plie: „Iu devus ilin legi, sed ankoraŭ ne faris.“ El la kunteksto aŭ el la koncerna verboradiko pove dedukteblas, ke iu intencas/planas/devas fari ion, sed tio ne apartenas al la signifo de O.

5. Ne serĉu la nuancojn en la participaj sufiksoj

Ni vidis, ke la menciitaj tri variantoj de itismo (PAG, PMEG kaj GDW) asertas, ke kelkaj participaj sufiksoj foje esprimas „aspektojn“, ke estas tamen kontraŭdiroj pri la signifoj inter la itismaj variantoj kaj eĉ interne de iu certa varianto mem. De kie venas tiu komplika situacio? Kial ne sufiĉas la simpla kaj ideala klarigo per A = dum la ago, I = post la ago kaj O = antaŭ la ago? La respondo estas bedaŭrinde: Ĉar Zamenhof ne uzis „senaspektan Esperanton“, tamen ankaŭ ne klaran alternativan sistemon por esprimi tem-

po(rilaton) kaj aspekton.

Li ne donis regulojn, sed nur ekzemplajn frazojn, el kiuj ĉiu deduktas iom aliajn regulojn, kaj tiel ekiĝis la teorioj de itismo kaj atismo kaj ties variantoj. Ĉiu klarigo de iu participo kun A, I aŭ O devenas de konkreta frazo, en kiu neeviteble la koncerna verboradiko ludas gravan rolon por la aktuala signifo. Depende de la koncerna verbo la lingvoproduktanto subkomprenas kaj subkomprenigas plurajn nuancojn pri tempo(rilato) kaj aspekto, kaj erare (sed kompreneble) la diversaj gramatikistoj atribuis tiujn nuancojn al A, I kaj O, kvankam ili apartenas al la koncerna verboradiko kaj ne (ĉiam) estas esprimitaj per morfemo.

Mi donu nur du ekzemplojn:

5.1 OT sen signifo de devo

La laŭdira devo en la signifo de OT eble venas de jena frazo de Zamenhof (Ekzercaro, § 22):

„Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto.“

Nun klarigu OT per „antaŭ la ago“. Tiam la frazo tekstas:

„Homo, kiun oni devas juĝi, estas antaŭ juĝo.“

Se „devas juĝi“ kaj „juĝoto“ priskribus la saman fakton, tiam ili estus ankaŭ interŝanĝeblaj, nome tiel:

„Homon, kiu estas antaŭ juĝo / juĝoto, oni devas juĝi.“

Tio okulfrappe ne ĝustas. El „devas juĝi“ sekvas „esti antaŭ juĝo“, sed ne inverse.

5.2 IT sen signifo de ĝisfineco aŭ sukceso

De Raymond Schwartz venas la instrua demando: „Kio estas pli utila, riparata horloĝo aŭ riparita horloĝo?“ – Nu, ankaŭ riparita horloĝo utilas nur, se la riparo okazis ĝisfine kaj sukcese. Oni jes laŭ neformulenda konsento inter la lingvo-uzantoj subkomprenas, ke riparita horloĝo estas bone refunkcianta; alikaze oni devus signali, ke ne estas tiel. Ĉiu-okaze la ĝisfineco kaj la sukceso de la riparo neniel estas parto de la signifo de IT, sed apartenas al la komuna scio, kiel uzi la verbon „ripari“.

6. Kiu estis la Zamenhofa lingvo-uzo?

La fakto, ke ekzistas itismo kaj atismo kaj pluraj variantoj de ili, jam indikas, ke la Zamenhofa lingvo-uzo estas diversmaniere klarigebla, tiel ke diversaj reguloj estas dedukteblaj. Dum la frazo (Ekzercaro, § 12)

„Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil septcent tridek dua.“

pravigas itisman vidpunkton, alia frazo, nome

„Mono havata estas pli grava ol havita.“ (Ekzercaro, § 22)

estas nur temporilate, do atisme klarebla (PMEG prisilentas tiajn okazojn, PAG eĉ malpermesus la formon „havita“.)

6.1 Nekongruenco de Zamenhofa lingvo-uzo

PAG (p. 153) kaj PMEG (paragrafo 29.2.2) konfesas, ke Zamenhof foje (do ne regule!) cede transiris al AT-participo, kiam la ago de la verbo-radiko estis neata aŭ pro alia kaŭzo perceptata kiel ne reale okazonta:

„La unueco de Esperanto neniam estos rompata.“ (Antaŭparolo de la Fundamento)

Tiu ekzemplo montras ankaŭ, ke la konata regulo de Raymond Schwartz (Uzu AT, se vi povas aldoni „plu kaj plu“, „iom post iom“ aŭ „ree kaj ree“, uzu IT, kiam taŭgas aldoni „definitive“, p. 25) ne ĉiam aplikeblas.

Sekve: neniuj sistemo de reguloj kondukas en ĉiu okazo al ununura formo de participo, ankaŭ ne senŝanceligeble al tiu, kiun uzis Zamenhof en sia verkaro. La pruvo estas simpla: Kompiluaron de Zamenhofaj frazoj kun diversaj participaj formoj, precipe kun AT-kaj IT-participoj, anstataŭigante A, I kaj O per „?“. Poste ĉiu, ĉu itisto aŭ atisto, enmetu la formojn laŭ sia instruo, kaj rigardu poste, kiom kongruaj la rezultoj estas inter si kaj kun la Zamenhofa versio.

6.2 De poste eblas ĉion „klarigi“

Nun ekzistas ĉiam la eblo „forklarigi“ ĉion per tute aparta intenco de Zamen-

hof ĝuste en la diskutata frazo. Ekzemple kiam Zamenhof uzis „batata“ anstataŭ „batita“, kvankam bato kaj batado ja laŭ la signifo de la verbo-radiko okazas ĉiam ĝisfine, tiam la itismo klarigas, ke temas en la frazo „Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato.“ (Ekzercaro, § 22) ne nur pri unu bato, sed ripeta aŭ daŭra ago. Tion oni fakte neniel povas konkludi el la frazo, kaj ĉu oni vere devus formuli

„Kiam Nikodemo batas Jozefon per (unu) bato, tiam Nikodemo estas la batinto kaj Jozefo la batito.“? Laŭ PMEG devus esti „batanto“, sed „batito“. Hm, ĉu mi komprenis tion bone?

GDW klarigus jene: Se Zamenhof uzus la A-formojn, tiam li celus la disvolvigantan agon, aŭ temus pri ĝenerala konstato; se li uzus la I-formojn, tiam la rezulto estus pli grava ol la ago.

Ni rigardu alian ekzemplon de Raymond Schwartz (p. 46):

„Nun mi sciigos al vi, kion mi faros el mia vinbergardeno: forigita (definitive!) estos ĝia barilo, kaj ĝi estos ruinigita (plu kaj plu, re-kaj-ree!); ĝiaj muroj estos disĵetitaj (unufoja faro definitiva!) kaj ĝi estos piedpremata (plu kaj plu, ĉiufoje, kiam homo aŭ besto pasos sur ĝi).“ (Jesaja 5,5; klarigoj de Schwartz)

Kial ne anstataŭe eblas jenaj participaj formoj:

„... forigata (iom post iom) estos ĝia barilo, kaj ĝi estos ruinigita (rezulto => definitive); ĝiaj muroj estos disĵetataj (unu muro post la alia, ripeto) kaj ĝi estos piedpremita (rezulto => definitive).“

Nu, kiel oni vidas, variaj klarigebloj permesas al aŭtoro preskaŭ ajnan uzon de A(N)T- kaj I(N)T-participoj. Egale, kiel oni analizu la Zamenhofan lingvo-uzon en specifaj frazoj de lia verko, mi (la aŭtoro) ja plej bone konscias pri tio, kion mi en mia frazo taksas plej grava, kaj neniuj atisma aŭ itisma redaktanto rajtas nun ŝanĝi ion en miaj participoj, ĉar mi ĉiam povas pravigi min per konvena ekzemplo el la Zamenhofa lingvo-uzo.

7. Kion fari? Praktikaj konsiloj

Ni devas vivi kun la balasto de ofte tro nuancendaj participoj, kun la manko de tempe/aspekte neŭtraj aŭ nur-stataj participoj. En kelkaj situacioj estas pli bone, eviti participojn, precipe la stato-indikajn, per aliformulado (sed ne per -iĝ-). Predikativaj participoj (do ilia uzo en „kunmetitaj verboformoj“) impresas peze, atributaj tamen povas gvidi al tre eleganta frazostukturo.

Uzi la participojn kaj eĉ instrui la uzon, estas komplike. Nek PAG, nek PMEG, nek GDW prezentas konvinkan sistemon. Participoj restas „gravega problemoj“, la titolon de tiu ĉi artikolo mi transprenis el „La Ondo de Esperanto“ (N-ro 4-5, aprilo-majo de 2006, p. 15). Verkis ĝin la prezidanto de la Akademio de Esperanto, Geraldo Mattos. Kaj li emfazas la supre menciitan kaj plene simetrian sistemon por la tri verboformoj kaj la ses participoj: A = dum la ago, I = post la ago, O = antaŭ la ago. Ĉu „ekstrema atisto“?

Ĉiuj kromaj nuancoj dependas de la kunteksto, precipe de la kutima uzo de la koncerna verboradiko. Se vi volas esprimi aspektojn (daŭro, ripeto, ĝisfineco, ktp.), tiam uzu aldonajn vortojn aŭ afiksojn.

Se vi tamen foje hezitas, ĉu ekzemple uzi A aŭ I respektive A aŭ O en participo, sentu vin libera elekti la formon, kiu laŭ via opinio plej taŭgas. Neniu povas pruvi, ke Zamenhof en via situacio elektus alian formon kaj ke nur tiu estas ĝusta.

Citita literaturo:

Kalocsay, Kálmán kaj Gaston Waringhien: Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. Kvara tralaborita eldono. Rotterdam, 1980.

Schwartz, Raymond: Ne kiel Meier! Invito al revizio de niaj konceptoj pri la konjugacio de Esperanto. Paris, [1963].

Wennergren, Bertilo: Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko. <<http://bertilow.com/pmeg>> Laste alirita je 2006-09-08.

Willkommen, Dirk: Esperanto-Grammatik. Hamburg, 2001.

Radio Aktiva el Urugvajo

Mi petas vin informi al kiel eble plej multaj geesperantistoj pri la lanĉo de Radio Aktiva, dulingva radio (kun programoj en Esperanto kaj la hispana), la 21an de septembro je la 00:00 GMT. Ĝi estas atingebla ĉe: <http://radioaktiva.esperanto.org.uy>

Estos programoj en la hispana por diskonigi Esperanton, kaj en Esperanto por geesperantistoj kaj dulingvaj por ĉiuj.

*Daniel Bebelacqua
rdba@adinet.com.uy*

STEB novaj materialoj

Estas novaj materialoj en STEB, la Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko. La materialoj troveblas sub la adreso: www.eventoj.hu

Supernovaoj: gastosteloj - la plej grandaj eksplodoj en la universo - Prelego de Amri Wandel en la Internacia Kongresa Universitato, IKU-2004, Pekino, Ĉinio (astronomio).

La formado de frupolitikaj rilatoj en la proto-baktria civilizacio de la bronza epoko - de Vladimir I. Ionesov (RU) - el Scienca Revuo kajero 165 (arkeologio).

Kulturo kaj socio de Norda Baktrio - laŭ la plej novaj arkeologiaj malkovroj - de Vladimir I. Ionesov (RU) - el Scienca Revuo kajero 160 (arkeologio).

Internacia Kongresa Universitato, IKU en 1996 - enkadre de UK en Prago - (miksitaĵ materialoj)

Konferenca libro: Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, AEST-1978 - formato rtf - (miksitaĵ temoj).

Konferenca libro: Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, AEST-1984, nutraĵproduktado - en formato rtf (miksitaĵ temoj).

Konferenca libro: Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, AEST-1989, fervojoj - en formato rtf (miksitaĵ temoj)

Indrikoterio - mamulo, vivinta antaŭ proksimume 30 milionoj da jaroj (zoo-logio).

"Pekoteko" - la famaj dosieroj de

Rüdiger Eichholz el la 1980aj jaroj (vortaroj, ceteraj)

Geologia vortaro - ĉeĥa-Esperanta de Václav Procházka kaj Josef Kavka (vortaroj).

Artikoletoj de Leo De Cooman pri 1. energio-laboro-laciĝo, 2. funkciado de televidilo, 3. varmoretroreflekto (ceteraj materialoj)

Fortakurenta terminaro - granda, kompleksa verko de 5000 esprimoj, aldona Esperanta parto al la papera libro, verkita de Gábor László (vortaroj).

Fakvortaro pri ŝako, 7 lingvoj, Esperanta, angla, rusa, franca, germana, hungara, hispana (vortaroj).

Astronomia almanako - de Rick Wiegmann, daŭre aktualigata (astronomio).

Tensio, kurento, povumo - Kiom konsumas komputiloj? - artikolo de Daniel Clemente.

laŭ Ret-Info

Elastischer Laib im Iran

Die „Westfalenpost“ meldete in ihrer Ausgabe vom 31. Juli 2006, dass der iranische Präsident Mahmut Ahmadi-nedschad „die Landessprache Persisch von zahlreichen westlichen Fremdwörtern befreien“ will. So solle die „Pizza“ künftig als „elastischer Laib“ bezeichnet werden, das „Handy“ als „Telefon, das man mit sich trägt“ und aus „faxen“ solle „in die Ferne schreiben“ werden. Insgesamt soll es sich um 2000 Wörter handeln.

*gefunden von
Anton Kronshage*

EU-bultenoj nun aperas en Esperanto

Dum sia duonjara prezidado de Eŭropa Unio, la oficiala Finnlando dissendas al eksterlando rilatajn informojn ĉefe en la angla kaj franca, sed unufoje semajne ankaŭ en latina. Nun la sama ĉiusemajna trarigardo de EU-novaĵoj estas havebla ankaŭ en Esperanto – informas oficiala novaĵletero, dissendita de la finnlanda registaro. Ankaŭ la nederlanda novaĵ-agentejo ANP jam informis pri la esperantlingvaj novaĵ-bultenoj.

Tim Morley kolektis teamon de diverslandaj esperantistoj kaj kontaktis la estron de la oficiala registara retejo "eu2006.fi" por demandi, ĉu eblus publikigi Esperantan version de la bulteno. La retestro tuj donis sian permeson, la unuaj latinlingvaj bultenoj estis rapide esperantigitaj, kaj aperis en la reto ĉe "conspectus.wordpress.com" Legu pli ĉe: www.liberafolio.org/2006/conspectus/

laŭ Ret-Info

Esperanto-eventoj alvoko al la organizantoj

Ni tre volonte informos en ĈEA-retkomunikoj ankaŭ pri viaj aranĝoj, sed ni devas pri ili scii! Baldaŭ ni dissendos la kalendaron por la venonta jaro. Por ke ĝi estu kompleta, bonvolu sendi bazajn informojn al la retadreso chrdle@kava-pech.cz

*Petro Chrdle
ĈEA-retkomunikoj*

KAEST rendevuo de fakuloj

Tradicia renkontiĝo de fakuloj "Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" okazos ĉijare inter la 10a kaj 12a de novembro en Dobřichovice.

Ĝis nun estas en la programo 14 kontribuoj el tre interesaj fakoj. La resumo de ĉiuj kontribuoj baldaŭ estos konsulteblaj ĉe www.kava-pech.cz/kaest Tie vi povas trovi ĉiujn bezonatajn indikojn pri la aranĝo kaj aliĝilojn.

laŭ ĈEA-retkomunikoj

Expolingua kaj Esperanto

Dum la tagoj 10a ĝis 11a de novembro 2006 okazos en Prago la 16a Internacia Foiro de Lingvoj, Edukado kaj Kulturo. La unuan fojon dum ĝi prezentiĝos ankaŭ la internacia lingvo Esperanto en la bloko "Lingvaj minikursoj", vendrede ekde la 14a horo. Pliaj informoj pri Expolingua troveblas ĉe: www.expolingua.cz

laŭ ĈEA-retkomunikoj